


STEPHAN

Membro de la LEA-Komitato de SAT (Parizo)

35

(4/2001)



LEA/G

MAGAZINO

Organo de la Libera Esperanto-Asocio por germanlingvaj regionoj
Organ des Freien Esperanto-Bundes für deutschsprachige Gebiete

Inkluzivas la organon
de la Aŭstra Socialista Ligo Esperantista (ASLE) La Socialisto

Mordernaj tempoj – modernaj asocioj

Jam delonge homoj, speciale junaj, vivas laŭ - mi volas diri - tiel nomataj *modernaj metodoj*. Tion efektiviĝis (k.ankoraŭ efektiviĝas ĉiutage) eltrovaĵoj kaj la hodiaŭaj viv-kondiĉoj en la tuta mondo. La vivmaniero estas opinioafero de la respektiva socia ordo kaj religio de la lando.

Mi opinias, ke junuloj ne ĉiam estas sur la ĝusta vojo, tamen, la supozita moderna vivo oni ne povas ŝanĝi, nur protesti kontraŭ aŭ provi, ĝin korekte kompreni kaj gvidi en prudentaj ebenoj.

La esperantistoj povas uzi nuntempe por plenumi iliajn aktivecojn la komputilon kaj la interreton. Ankaŭ aĝuloj ne hezitas uzi ambaŭ la helpilojn. Per ili estas pli facila ellabori la asocian organon, gazetojn, listojn kaj tekstojn. Tial nia LEA/G ne estu malantaŭe pro tiuj help-iloj, sed uzu ilin por la ja tre grava afero: Kompreno inter la homoj tutmonde.

Krom la komputilo Gary Mickle, la redaktoro de nia organo *MAGAZINO*, jam kelkare uzas interreton. LEA/G havas paĝojn en ĝi kaj, la eĥo estas tre kontentiganta. La redaktoro intertempe ricevis tiel multe da materialo, ke nun nia asocio bezonas ekstran redaktoron por prilabori interreton.



Pro tio mi opinias, ke ni eldonu du informilojn interrete por tiuj membroj kaj simpatiantoj, kiuj posedas interretan eblecon, kaj duan por tiuj, kiuj ne povas uzi ĉi tiun komunikilon. La titolo *MAGAZINO* validas por ambaŭ la eldonoj.

Kaj: Ni ŝanĝu la statuton en *Reguloj*. Bv. legi la proponon tiurilate sur la paĝo 7.

Oberkirch, 01.12.2001

Stephan

Kaj 'la granda mutularo' ?

Ĝojiga fenomeno estas la ofiĝo de diskutoj ŭri la lingva problemo en EU : ĝi povas pli konsciigi la politikan gravecon de tiu problemo. Tamen esperantisto aŭskultanta aŭ leganta referaĵojn de interlingvistoj, en kiuj estas prezentataj ĉiuj solv-modeloj indaj esti menciitaj, sentas iom da malkontento ĉe paradomarŝo de diversaj konceptoj, ĉar :

a) Tuj modelon alportas nenion novan (la latina, la poligloto...);

b) Pluraj modeloj estas kabinetaj kaj elitismaj, konsiderante nur diplomatojn, natursciencistojn, fincan burokrataron, do, ni diru, centmil homojn de EU, sed la eblecoj k. aspiro al vera demokratio de 371 milionoj da homoj (loĝantaro de EU) estas neglektataj : 'la granda mutularo' rajtas nur senvorte akcepti la volon de imperiestroj kaj reĝoj ;

c) En tiu idearo iom kaosa, Esperanto aperas nur en la konceptoj de prof-ro Frank kaj d-ro Bormann, kiel vidiĝis en la referaĵo de d-ro sc.D.Blanke ĉe Berlina Esperanto-Ligo (dato : 24.08.01) pri tiu ĉi problemo : Ĝenas ne la malmulteco de Esperanto-vidpunktoj, sed la manko de altprestiga reago de niaj teoriuloj al pluraj erarigaj konceptoj kaj ĝenerale al fuŝaj opinioj pri tiom bone fundamentita argumentado por Esperanto – ili malsuperas eĉ la vidpunktojn esprimitajn antaŭ pluraj jardekoj de Schuchardt, L.B.de Courtenay, Otto Jespersen k.a.

Jam revoluciulo de la 1848-a generacio skribis : « Por ne erari en niaj konceptoj ni restu proksime de la popoloj. » Guste ĉi tie kuŝas la forto de Esperanto, forto socie ankoraŭ pli ebla ol reala – komencita situacio de ĉiuj profundaj iniciatoj. Niaj teoriuloj interkverelas anstataŭ kunagi eksteren, tial nia voĉo audiĝas senforte, kvazaŭ sub la tablo, ĉar unuopulo malofte kuraĝas alfronti kiel 'ateisto' diversitajn 'religianojn' : oni timas 'kompromitiĝi'. Do, ni kapitulacias ĉemane kun granda veraĵo, kiun virtuale jam posedas 'la granda mutularo'.

Konklude ni atendu la renaskiĝon de Zamenhof, Privat, Lapenna, Neergard kaj de aliaj klarvidaj spiritoj, kiuj denove donu

(Daŭrigo – paĝo 3)

Enhavo – Inhalt

Modernaj tempoj-modernaj asocioj	1
Kaj 'la granda mutularo' (Bociort)	2
SAT = Interkompreniĝo	2
Komputilaj kapricetoj	3
Ausstellung v.Hüser in Paris	4
Dimensio de malbono k.a.	5
Jubileo Gresillon E.-Domo	6
ADORU – Diserva libro (P.Eichkorn)	6
Regeln des Freien E.-Bundes	7
Fortsetzung d.Regeln k.a.	8
Traduko poemoj(Retzlaff)	9
Kontr.flanka frapo de naturo (Minĉev)	10
Interrete angla...	10
Kathmandu (Nepal E.Asocio)	11
Humoro	12
Landokodoj	13
Ege komplika parenco	14
La maldekstrul.en Germanio	15/16/17
Hobio ? Ne ! (Modesto)	18
Grußwort zur Geschichte LEA/G	19
Interŝanĝoj de spertoj k.a.	20
Apernotoj	20
Oberkirch im Sonderheft (Poppeck)	21
SAT-Amikara Kongreso 2002	22/23
Missverständlich	24
Alfabet des Esperanto	24



(Daŭrigo de 'la granda mutularo' ?)

ekzemplon al niaj hodiaŭ multe pli multaj bone preparitaj sciencistoj ol jam antaŭe, certe kapablaj vekti la dormantan arbaron fabelan.

Iuj niaj ĵurnalistoj, kies majstreco finiĝas ĉeetikado, eble vidos en ĉi-komentoj senpretendaj 'finvenkismom', 'lapennismon' k.s. Ĉio ĉi estas nur sincera ĉiam denove necesa invito al niaj teoriuloj kuraĝe, senkompromise, kune argumenti pri la racia lingva helpilo por la 'granda mutularo', kiu dum ĵarmiloj neniam povis 'aŭdi' ailingvanojn, komuniki kun ili.

(el : Berlina Informilo) Ignat Florian Bociort

Komputilaj kapricetoj

Por subteni la redakcion en Berlin, kamarado Stephan en Oberkirch transprenis kelkajn asociajn taskojn l.a. preparado de la komputilskribataj eldonoj de MAGAZINO.



La komputilo en Oberkirch jam havas *grizajn harojn*, kio signifas, ke ĝi teknike ne povas konkuri kontraŭ la maŝino de la ĉefredaktoro en Berlin.

Komputil-uzantoj kelkfoje spertas, kiujn *kapriolojn* tia helpilo okazigas. Antaŭtamas preskaŭ ĉiutempe, ke la komputilo ĉesigas la funkcion, perdas la programojn, ĉar ŝi aŭ li senintence premis iun klavon erare sur la klavaro.

Ekzemple la komputilo en Oberkirch kelkfoje rifuzas prezenti *horizontalan linion*. (Povas ja okazi, ke mi mem faris tluan obstaklon per erara tuŝo de iu klavo!)

Kion fari, se MAGAZINO 'ekspektas' diversajn liniojn diversloke ? Ekzemple tiujn sur la kapoj de la paĝoj ? La edzino proponis al Stephan « Forlasu la liniojn, ili faras



impreson kiel landlimoj kaj SAT estas senlima movado – ĉu ne ?>

Tio ja ne estas ĝusta – SAT estas internacia. Mi, do, streĉis min, prepari espereble samaspektan buktenon, kiel Gary tion sperte faras. AFS

S A T = Interkompreniĝo

Nia movado ne estas partipolitika, sed nur kleriga, eduka, kultura organizo. Ĝi celas, ke ĝiaj membroj estu komprenemaj kaj toleremaj rilate al la politikaj kaj filozofiaj skoloj aŭ sistemoj, sur kiuj sin apogas la diversaj laboristaj partioj kaj sindikatoj. Per komparo de faktoj kaj ideoj, per libera diskutado ĝi celas malebligi ĉe membroj la dogmiĝon de la instruoj, kiujn ili ricevas en siaj apartaj medioj.


SAT celas per konstanta uzado de racie elpensita lingvo kaj ĝia mondskala aplikado, helpadi al la kreado de racie pensantaj spiritoj, kapablaj bone kompari ĝuste kompreni kaj prijuĝi ideojn, tezojn, tendencojn kaj sekve kapablaj, elekti memstare la vojon, kiun ili opinias plej rekta, aŭ plej irebla por la liberigo de sia klaso kaj forkonduko de la homaro al kiel eble plej alia ŝtupo de civilizo kaj kulturo.

(el la Statuto de S A T)

SAT-anoj kutimiĝu al eksternacia sent-, pens-, kaj agad kapabloj ! LANTI

EKSPOZICIO PRI LA HISTORIO
DE LA LABORISTA ESPERANTO-
MOVADO

Ausstellung zur Geschichte der Arbeiter-Esperanto-Bewegung



Paris 22.09.2001: Die Ausstellung *Laborista monda esperantista movado* wurde bis zum 9. Oktober ds.Js. in einer sehr schönen Galerie in der Innenstadt von Paris präsentiert. Viele Freunde der internationalen Sprache Esperanto und auch Besucher, die neugierig waren, was denn geboten wurde – sie kannten weder Esperanto noch die Arbeiter-Esperantobewegung S A T – informierten sich anhand der Schautafeln und Tischauslagen über das Entstehen und Werden der Bewegung. Die Mehrzahl interessierte sich für die anstehenden Themen, zögerte nicht, Informationsmaterial mitzunehmen. Da waren Besucher, die sozusagen *kurz entschlossen* ihre Bereitschaft erklärten, Esperanto zu erlernen.

Dank der Helfer von der Arbeiter-Esperantogruppe Paris verlief die Ausstellung im Ganzen sehr zur Zufriedenheit des Ausstellers S A T. Besonderen Dank dem Fritz-Hüser-Institut für deutsche und ausländische Arbeiterliteratur, Stadt Dortmund, dessen Leiter Professor Dr. R.Noltenius vor mehr als zwanzig Jahren begann, im Institut Esperanto-Literatur und anderes zu archivieren. Eduard Weichmann sorgte rastlos für Material. Unter seiner Assistenz entstand 1983 die erste Ausstellung. Wir freuen uns, dass heutzutage unser Jiri Proskovec im Interesse der Esperanto-Sprache aktiv im Institut tätig ist.

AFS

Anm.: Der Begleittext mit zahlreichen Fotografien zur Ausstellung (broschliert, zweisprachig deutsch/Esperanto) kann bezogen werden gegen 5 Euro bei: Freler Esperanto-Bund p.Adr. A.F.Stephan, Renchener Str.47, 77704 Oberkirch (Baden).

Dimensio de la Malbono

Teroro en Nov-Jorko

La doloro de la affliktitaj homoj trafas ankaŭ nin; ni funebras kun la loĝantaro de la nordamerika ŝtato kaj esperas, ke la prezidento kaj liaj gvidantoj bonpripenso agas, ĉar post venĝo sekvos venĝo.

Kontraŭ teroro ne helpas milita engaĝiĝo per raketoj kaj ankaŭ ne retorika milito. Helpas nur – kaj estus helpinta, eviti mal-bonon – mondvesta politiko por egaligo de l'vivnivelo, malfermiteco por la kulturoj, multampleksa ko-operacio kaj ne fine la rezigno pri la tutmonda hegemonio de la okcidenta mondo.

USONO jam nomis pluajn ŝtatojn, kie laŭ ĝi teroristoj oni kontraŭbatalu. Ŝajnas, ke ni iras renkonte al *interesaj tempoj*. Mi povas rezigni pri ili!

Stephan

LA LABORISTA ESPERANTO-MOVADO



La ĉi-supra fotografajo apartenas al la ekspozicia materialo pri la *Historio de la Laborista Esperanto-Movado*. Ĝi montras Laboristajn Esperantistojn, kiuj manifestaciis por la Internacia Lingvo en la jaro 1930, en urbo Dortmund. La simboligita Babelturo kaj la diversaj kostumoj aperigas la lingvan haoson.

Ilustrita historio de la
Laborista Esperanto-Movado
Al la laboristoj en ĉiuj landoj unu lingvon.

Illustrierte Geschichte der
Arbeiter-Esperanto-Bewegung
Den Arbeitern aller Länder eine Sprache.

*(Germana/Esperanto - broŝuro kun foto,
116 paĝoj, 5 Euro inkl.ekspedkosto)*

Havebla ĉe: *Freler Esperanto-Bund für
deutschsprachige Gebiete
Renchener Str.47, (DE)77704 Oberkl*



PRI LA 50-JARA JUBILEO DE LA
EKZISTADO
DE KULTURA ESPERANTO-DOMO
GRESILLON

Sub la titolo *Greziĵonanoj rakontas pri Greziĵono, ekde ĝia naskiĝo, laŭ siaj rememoroj*, estas planita por la jaro 2002 la publikigo de libro, kiu entenos ĉirkaŭ 300 paĝojn kun nigra-blankaj kaj koloraj bildoj. Tiu verko kronikos 50 jarojn da Esperanto-vivo.

La Esperantistoj kaj simpatiantoj al la Internacia Lingvo havas de nun la eblon helpi en la koncerna publikigo per antaŭmendo, ĝirante la sumon de 330 Francaj frankoj en la jenan specialan poŝtan konton: **Lloancy Marie-Thérèse - Memorlibro, 5 908 07 A, Bordeaux**. Al la koncerna sumo la mendantoj bonvolu aldoni la sendokoston respondan al 300-paĝa libro.

La interesigantoj pri la afero povas ankaŭ kontribui per libervolaj monaj donacoj.

Pliaj klarigoj estas haveblaj sub la jena adreso: **Marie-Thérèse Lloancy, 6, rue Saint-Michel, 64000 Pau (Francio)**. Oni povas telefoni ankaŭ sub la numero **05.59.30.56.21**.

Laŭ informo.



Antaŭ la milito oni povis pagi la kotizon per STELOJ!

Aperis la oficiala Diserva Libro
de IKUE kaj KELI
ADORU

Ĝi estas - riĉ-enhava libro kun 1472 paĝoj; kun multaj kristanaj kantoj (kun muziknotoj) internacie elektitaj melodioj kaj kantoj; bibliaj tekstoj kaj preĝoj por Diservoj kaj por privata uzo; mes-tekstoj laŭ la oficiala meslibro.


La libro estas profesie presita sur eksterordinare maldika papero 33-grama, do, ne tro peza (540 gramoj), ne tro dika (3 cm), ne tro granda (10,5 cm x 19 cm, la formato de ĉi tiu folio) kaj solide blindita en helruĝa tola kovraĵo aŭ altvalore kun nigra leda kovraĵo kaj ora tranĉaĵo!

Tekstoj kaj melodioj estas zorge kaj altkvalite elektitaj, las bildo de ĉiuj notoj kaj tekstoj estas profesikvalita.

Presis la libron la presejo de Herder-Eldonejo en Freiburg (Baden).

Prezoj: tola kovraĵo 19,80 Euro
nigra-leda kovraĵo 48,- Euro

Mendebla ĉe: Pastro Bernhard Eichkorn
Romäusring 20, (DE) 78050 VS-Villingen
(Fakso: +49(0)7721 22074)



Ek de januaro 2002 bv. pagi kotizojn kaj donacojn per EURO.

Regeln des Freien Esperanto-Bundes für deutschsprachige Regionen

1. Der Bund ist als deutsche Gruppe der Dachorganisation der Arbeiter-Esperantisten - S A T (Sennacieca Asocio Tutmonda, Paris) gemäß *Göteborgs Konvention von 1928* angeschlossen. Demokratie, Humanismus, Sozialismus und Freiheit sind Grundlagen für die Tätigkeit des Bundes.

Es werden ausschließlich und unmittelbar gemeinnützige Zwecke verfolgt.

Sitz des Bundes ist der Wohnsitz des jeweiligen Bundessekretärs.

2. Es soll die Weltsprache ESPERANTO in der Bevölkerung der deutschsprachigen Länder - Deutschland, Österreich und der Schweiz - bekannt gemacht werden.

Zu dem Zweck wird Informationsmaterial u.a. eine Info-Zeitschrift herausgegeben. Informationsbezug über Internet ist eingerichtet.

Der Bund bemüht sich Lernmöglichkeiten zum Beispiel per örtlichem Kurs, Fernunterricht und in in- und ausländischen Seminaren einzurichten. Nachweise zum Bezug von Lernmaterial und Lesestoff in Esperanto werden geliefert.

Vorträge, Ausstellungen z.B. durch das Fritz-Hüser-Institut für deutsche und ausländische Arbeiterliteratur, Stadt Dortmund, sowie Herstellung von Kontakten zur Presse, zu Gewerkschaften, demokratischen Parteien und Kulturorganisationen sind Aufgaben des Bundes.

3. Die Geschäfte des Bundes führen ein Bundes-Sekretär und der Verantwortliche für die Finanzen in gegenseitiger Verständigung durch. Außerdem sind Bundesberater vorgesehen. Die Finanzen werden jährlich von einem Revisor kontrolliert.

Über eine erforderliche Neubesetzung werden die aktiven Mitglieder informiert, die dann die Möglichkeit haben, Einspruch zu erheben. Eine Abstimmung im bisherigen Sinne ist nicht erforderlich.

4. Zur Erfüllung des Bundeszweckes wird von den Mitgliedern jährlich ein Beitrag erhoben. Spenden darüber hinaus sind willkommen. Der Bezug der Info-Zeitschrift

ist im Beitrag enthalten. Für deren Bezug ohne Mitgliedschaft wird eine Gebühr erhoben. Wenn eine solche Gebühr (Beitrag) nicht in den ersten drei Monaten eines Jahres für das neue Jahr eingeht, geht der Bund davon aus, dass eine Mitgliedschaft, ein Bezug der INFO-Zeitschrift nicht mehr gewünscht ist. Spätere Zahlung bewirkt zwar Fortsetzung, jedoch nur vom 1. des Monats an, an dem der Betrag auf dem Konto des Bundes eingeht; eine solche Zahlung gilt nur bis zum Ablauf des laufenden Jahres und bedingt keine Nachlieferung.

5. Mitglied oder nur Bezahler der INFO-Zeitschrift kann jeder werden, der Ziel und Zwecke des Bundes (s.2.) anerkennt und nach Möglichkeit unterstützt. Aktive Mitglieder haben uneingeschränktes Stimmrecht. Andere Personen können Vorschläge unterbreiten, über die aktive Mitglieder befinden. Sympathisanten können den Bund finanziell unterstützen.

6. Für die Herstellung und Herausgabe der INFO-Zeitschrift wie auch der Regulierung der Internetseiten sind aktive Mitglieder verantwortlich. Jedem Esperantosprecher steht die Mitarbeit mittels Lieferung von Texten u.a. offen. Eine gleichzeitig eingegangene Mitgliedschaft oder Zeitschriftbezug wird begrüßt. Die Redaktion hat das Recht, die Brauchbarkeit der Einsendungen zu prüfen, kann kürzen oder ablehnen.

7. Ist ein Fortbestehen des Bundes aus welchen Gründen auch immer nicht mehr möglich, wird die Vereinigung automatisch aufgelöst. Dafür sind der Bundessekretär und der Finanzbetreuer verantwortlich. Es soll aber geprüft werden, ob eine Weiterarbeit in anderer Form ermöglicht werden kann.

8. Der Bundessekretär berichtet am Anfang eines Jahres von den Aktivitäten, Vorfällen und sonstigen Gegebenheiten aus dem Vorjahr in der INFO-Zeitschrift. Der Stand der Finanzen wird nur aktiven Mitgliedern gesondert bekannt gegeben.

9. Das Geschäftsjahr umfasst den Zeitraum vom 1. Januar bis 31. Dezember.
10. Diese Neuorganisation des Bundes gilt ab 1ten Januar 2002. Das bisherige Bundesstatut erlischt mit gleichem Tag. Eine Abstimmung ist nicht erforderlich, jedoch werden Einwände von aktiven Mitgliedern besprochen. Förderliche Vorschläge finden Berücksichtigung, sie werden in der INFO-Zeitschrift veröffentlicht und können zu Änderungen der Regularien führen.

Oberkirch, den 20. Oktober 2001

Albert Stephan

Hinweise: Infolge Mangel an Freiwilligen, die Funktionen auf ehrenamtlicher Basis übernehmen, habe ich die o.a. Änderungen ausgearbeitet. Es dürfte ein Anliegen der langjährigen älteren Mitglieder sein, schon allein aus Tradition unseren Bund weiterzuführen. Wir werden schwerlich daran interessiert sein, als Sektion im Deutschen Esperanto-Bund fortzubestehen. Das besagt aber nicht, dass unser Bund dem DEB die Zusammenarbeit verweigert.

Unsere Dachorganisation ist S A T; der übernationalen Vereinigung sind wir verpflichtet.

Stephan

Was ist Esperanto *links*?

Die Ziele von Esperanto *links* sind, deutschsprachige linke Medien, Organisationen und Einzelpersonen über Esperanto und Aktivitäten von Esperantisten zu informieren, die in den großen Medienanstalten verloren gehen. Die Aktivitäten sind keine Konkurrenz zu Nachrichtenagenturen. Die Macher von Esperanto *links* hoffen aber, ab und zu einen bunten Punkt unabhängiger Information zu setzen.

SIMILE AKTIVA estas la laboristaj esperantistoj en Francio. SAT-Amikaro, LEA-movado en Francio, eldonas jam dum multaj jaroj la INFO-SERVO-n (en franca lingvo, redaktoro Henri Masson) por certaj gazetaraj i.a. sindikataj.

LEA/G klopodigis siatempe esti simile aktiva, kolektis nomojn kaj adresojn de gazetoj kaj komencis ekspedi germanlingvajn informojn pri Esperanto k.a.

Bedaŭrinde jam tuj poste la aktivecoj tiorilate devis ĉesigotaĵi, ĉar mankis (kaj mankas ankoraŭ hodiaŭ) kunlaborantoj.

AFS

Jarŝanĝo

Dankon al ĉiuj, kiuj helpis, ĉu per konsilo, ĉu ago, ĉu per financoj, ke nia asocio povis daŭrigi aktivecojn por la bona afero: **ESPERANTO!**

Apartan dankon meritas jenaj aktivuloj: Friedel Bues, Manfred Führer, Hans Jankowski, Karl-Helz Kersting, Franz Knöferl, Gary Mickle, Karl-Ernst Paech, Jiri Proskovec, Hans Rodewig, Hermann Scheffler, Michael Scherm, de kiuj ĉiu helpis laŭ sia ebleco.

Dankon ankaŭ al tiuj, kiuj per donacoj zorgis, ke la kaso povis financi asociajn taskojn: varbado, eldono de **MAGAZINO**, subteno de la francaj gekamaraĵoj, kiuj ebligis la ekspozicion de Hüser-Instituto *Al la laboristoj en ĉiuj landoj unu lingvon!*

A. Stephan

Ĉu la vivo estas justa?

Romano estas kvar jaroj, li havas opinion



pri la temo *Justeco*:

« ...justa estas, kiam la pli grandaj,
ne draŝas la malgrandajn... »

Printempa nokto

Super mi tra la aeroj
migrobirdojn aŭdas mi.
Jam odoras aromeroj
kaj ekfloras ĉie ĉi.

Emas mi jubili, plori,
nekredebla estas ĝi!
Malnovaj voĉoj sori
Kun la luna bril' al mi.

Steloj diras tion, kion
sonĝas arboj ĉirkaŭ mi,
naĵingaloj kantas tion
'Estas via ŝi, jes ŝi!'

(Joseph Freiherr von Eichendorff,
1788 – 1857, esperantiĝis
Manfred Retzlaff, Originaltext
auf Seite 20)

Memorigo

Laŭra, ĉu nia bonaj jaroj de kun-esto
estas jam ne entute de vi forgesita,
kiam ni, nur pri ni, pri ni mem okupitaĵi
volis tute ne zorgi pri l'fremda mondresto?

Kiel malvarmetec' sub jasmen' etendiĝis,
kie la rivereto susure fluadis,
tie ofte ni am-dezirojn malkaŝadis,
unu al la alia, kaj per nokt' kovriĝis.



Malantaŭ pala nubo la luno vidiĝis,
Prilumanteneĝ-bruston kaj ringojn el oro;
Al via ĉarmo dia graci' aldoniĝis.

Kiel mi raviĝis tiam via koro,
buŝ' al buŝo, okulo en okul' perdiĝis,
ĝem' kun ĝemo kaj ploro miksis sin kun
ploro.

(de: Adamo Mickjeviĉo (Adam Mickiewicz,
1789 – 1855) tradukita el la pola lingvo de
M.Ratislavo)

Kontraŭflanka frapo de la naturo

Dum nuntempa etapo la ekonomia kaj kultura evoluado, la homaro ekstarigas antaŭ senĉesa pligrandiganta lavado de sciencoteknikaj atingoj. Sed in sia konkurado, celante amasigi materialajn valorojn, rezervo de nutraĵoj k.a. ĝis tia grado, ke la naturo eksuperŝutindas kun defalajoj de tiaj agadoj, ke hodiaŭ la naturo ne kapablas melpurigi de arigaĵoj.

La civilizita mondo ekkreas siajn grandegajn kaj danĝerajn kreaĵojn konkrete en donitaĵoj de naturmedio. Ĉar nepoveblas haltigi sian supreniron, ni estas devigita serĉi la kaŭzojn pro ekologiaj krizoj.

Ĉiutage pli kaj pli grandigas turmentigas signaloj de scienculoj kaj sociagantoj, kiuj laŭtigas voĉon pro saĝprudenta uzado de naturaj valoroj. Tio ja estas krio – alvoko al scienco kaj politiko en ĉio ŝtato tutmonde.

La nia ĉiutageco estas ege plenugita kun objektoj, iloj kaj preparoj – produktaj de la sinteza kemio. Tamen la naturo ne povas likvidi defalajn produktaĵojn dum ili amasiĝas kaj malpurigas vivkondiĉojn kaj, kon krete, la homon. Penige estas por oni konfesi, ke la homaro uzas la naturajn donitaĵojn kiel neelĉerpeblan tenejon. Nia avido por kontentigo kaj prospero kreskas kaj, homo pli kaj pli rimarkeble transŝanĝas aspekton de sia planedo. Ĉiujare oni brilligas miliardajn tonojn da ŝtonkarbonoj, nafto. Samtempe tio signifas, ke en atmosfera oni akiras miliardtone karbonan dioksidon.

Kial estas plene pravigita la ekologio, por ke ĝi evolui per nekredible rapida, eĉ urĝaj tempoj. Sed ne sufiĉas nur konstati la rompitan ekvilibron en la naturo sen konkretaj entreprenoj. La potenca kaj disbranĉita industrio ekglutas kaj relaboras multe da krudaĵoj prenitza de la naturo. Per ili pliforte ekmalpurigas la planedon, sed ĝiaj dimensmezuraj ne estas limigitaj. Tiuj etaj ekzemploj sufiĉas por igi prudentan homon, iomete ekspensigi sin. Mankas superflua pesimismo, sed nia estonteco tro minacos.

La homo imagas la evoluadon, sed nur iomete. Tio ankoraŭ ne sufiĉas. Li estas devigata ne forgesi, ke li mem estas ereto de la naturo, ne reĝo. La leĝo de la naturo estas konforme al la aperigo de produktoj.

Ivan Tr.Minĉev (Bulgario)

Rim. de l'redakcio : Pluajn artikolojn de Minĉev sekvos en venontaj eldonoj de MAGAZINO

Interrete angla...

James Murdoch, la plej juna filo de la amaskomunikila magnato Rupert Murdoch, avertis, ke la angla ne iĝos senopone la lingvo de Interreto, kaj internaciaj firmaoj devas enkalkuli ĝian malpliigantan gravecon.

Parolante ĉe la internacia televida festivalo en Edinburgo, Murdoch, administranta vicprezidanto de la firmao *News Corp* de sia patro kaj direktoro ankaŭ de la firmao *Star TV*, diris ke kvankam la angla restas ŝlosila lingvo por Interret-uzantoj, aliaj lingvoj pli gravas, kiel la ĉina, la hinda kaj la hispana.

Se komunikaj firmaoj volas konkuri en la tutmonda merkato, li diris, ili devas enfokusigi ĉiujn kvar lingvogrupojn. *Ĉi tiuj kvar grupoj, ĉiuj tutmonde disvastiĝintaj, estas kaj plu estos plene superaj rilate la suman grandon de la merkato!*

Li aludis esplorojn faritajn en USONO, kiuj antaŭvidas, ke kvankam duono el la nuna uzantaro de Interreto estas usonanoj, tio proporcie falos al triono ĝis 2004. Li diris, ke *Goldman Sachs*, la investaj bankistoj, taksas, ke troviĝos 96,6 milionoj da Interret-uzantoj en Ĉinio ĝis 2002. Kreskado de Interreto en Ĉinio superas la prognozitan kreskon je 25%.

(Daŭrigo paĝo 11)

(Interrete angla...)

La ĉina, li atentigis, estas la plej parolata lingvo kun 835 milionoj da parolantoj, sekvate de la angla kun 470 milionoj, la hispana kun 330 milionoj kaj la hinda kun 300 milionoj.

En Usono kaj Britio, li diris, la koncepto pri kultura imperiismo marŝas antaŭen, malatenta pri ŝvelantaj neanglalingvaj merkatoj, aŭ, pli malbone, konscia pri ili, sed ankoraŭ kredanta, ke la komuna lingvo de la moderna epoko estas kaj plu estos la angla.

Estas vere, ke la angla estis la ĉefa lingvo de Interreto ĝis nun, kaj estas vere, ke ĝi ĉiam estas grava potenco, tamen, kun konektado penetras pli profunden en la grandegajn merkatojn ekster Eŭropo kaj Usono... oni malpli uzos rete la anglan.

La angla ne iĝos la *implicita lingvo* de la diferenca mondo!

(laŭ The Guardian 29.08.00)

Kursoj en Kathmandu

Inter la partoprenintoj de la junulara skisemajno apud Trondheim estis la 30jara Kabindra Raj Shakra el Nepalo. Survoje hejmen li vizitis la oficejon de la Norvega Esperanto-Asocio. Ili demandis lin pri la Esperanto-agado en lia hejmlando.

Kvankam la intervjuo estas el la lasta jaro, ni ne volas preterlasi prezenti ĝin al la legantaro.

La Redakcio

En Norvegio lastatempe estas malfacile varbi sufiĉe da partoprenantoj por niaj kursoj. Apenaŭ ni sukcesas venigi dekon de lemontoj, eĉ en Oslo, malgraŭ multegaj afiŝoj k.a. Kiel estas en Nepalo?

-Nu, ni aranĝas ĉiun monaton kurson por komencantoj en Kathmandu, la ĉefurbo. Povas veni de 10 ĝis 50 aŭ 60 Komencantoj. Do, en la daŭro de jaro ni varbas eble 500 novajn esperantistojn.

Mirinde! Tiaj nombroj estas ĉe ni preskaŭ ne-imageblaj. Kion vi faras por venigi ilin?



Foto: Knut Lyngstad

-Ni metas anoncojn en la gazetoj, kaj tio atiras kelkajn, sed mi havas la impreson, ke la plejmulto venas pro buŝaj informoj de amikoj kaj parencoj. Kaj grava en tiu rilato estas la Himalajaj Renkontiĝoj, t.e. internacia turisma aranĝo, kiun ni okazigas ĉiun duan jaron ekde 1995. Lastfoje partoprenis 85 eksterlandanoj, krom sesdeko da nepalanoj. Pri tiuj eventoj raportas nepalaj gazetoj kaj televido, kaj poste, kiam ni anoncas la kursojn, la homoj aŭdis pri la lingvo kaj multaj volas ĝin eklerni. Problema estas nur tio, ke mankas al ni spertaj kursgvidantoj, precipe por la progresantoj. - Per la profito el tiuj aranĝoj ni planas konstrui novan Esperanto-domon por kursoj kaj tranoktigo de gastoj. Kaj ni esperas, ke ni iam estos sufiĉe fortaj por povi aranĝi grandan azian kongreson!

Tamen laŭ statistiko de UEA estas nur 10 membroj en Nepalo.

- Eble nur 10 pagis la internacian kotizon, sed efektive centoj da homoj lernis la lingvon kaj kiam ni aranĝas ian eventon, ni povas kalkuli pri almenaŭ kvindeko da helpantoj.

Do ne nur la anglan la homoj volas lerni, kiel en Norvegio en la lastaj jaroj?

(Daŭrigo paĝo 12)

(Daŭrigo – Kathmandu)

- Estas iom simile ĉe ni, sed estas ankaŭ intereso por lerni aliajn lingvojn, ekz-e la francan, la italan kaj la germanan, eĉ la japanan – kaj ankaŭ Esperanton! Vidinte la Himalajan Renkontiĝon, ili komprenas, ke ankaŭ Esperanto utilas por akcepti turistojn kaj gastigi eksterlandanojn. La nepalanoj estas la plej gastama popolo en la mondo kaj ili volonte gastigas ankaŭ orientanojn kaj samlandanojn.

Do ni bonvenigos novajn partoprenantojn, kaj ili helpas plu stimuli la interrilaton pri Esperanto en nia lando.

DD

(laŭ Norvega Esperantisto 1-2001)

MAGAZINO rim.: Ĉi tiun tekston ni ricevis de kamarado Hans Jankowski, Dortmund, kiu estas entuziasma vizitanto de Nepalo.

Die Renten sind sicher?



Abraham, kion vi kunportis el Parizo?

Iomete humuro

Patrina zorgo

Abraham, nia Mejra promenaĉas en mallumaj lokoj kun Marik.

Nu, ĉu tio estas tragedio? Ili ja estas junaj.

Abraham, sed ili jam interkisas!

Je la sano! Ĉu vi envias ilin?

Post du semajnoj...

Abraham, hieraŭ ili drinkis vinon.

Vino ne estas brando.

Sed poste ili...seksumis.

Aŭskultu! Kion vi volas de mi?

Vi ja estas la patro! Se vi nenion entreprenos, li povas kutimigi nian filinon eĉ al fumado.

Ĉu la pensioj estas sekuraj?

Landokodoj

Konforme al la normo ISO 3166 de internacia Organizo por Normigado UEA uzas 2-literajn kodojn por landonomoj. La uzado de ISO-kodoj rapide plivastiĝas kaj jam ĝeneraliĝis por indiki valutojn. La valutkodoj estas 3-literaj: landokodo + la unua litero de la valuto (ekz. JPY = Japan Yen, USD = US-Dollar). La ŝtatoj en Eŭropo-Unio havos ek de 1a de januaro 2002 komunan valuton, la Euro (mallonge Eu aŭ Eur. Mi estas kontraŭ la pluralan esprimon pro la belsono: Euroj. Laŭ mia opinio sufiĉas 1 Euro, 2 Euro, 100 Euro ktp.

Ĉisube aperas la kodoj de la landoj aŭ landpartoj, kie UEA ankaŭ SAT, havas membrojn.

Stephan

AL Albanio	DE Germanio	KZ Kazahio	PL Pollando
AM Armenio	DK Danio	LK Srilanko	PR Portoriko
AO Angolo	DZ Alĝerio	LS Lesoto	PT Portugalio
AR Argentino	EC Ekvadoro	LT Litovio	RE Reunio
AT Aŭstrio	EE Estonio	LU Luksemburgio	RO Rumanio
AU Aŭstralio	EG Egiptio	LV Latvio	RU Ruslando
AZ Azerbajĝano	ES Hispanio	LY Libio	RW Ruando
BA Bosnio- Hercegovino	ET Etiopio	MA Maroko	SE Svedio
BD Bangladeŝo	FI Finnlando	MD Moldavio	SG Singapuro
BE Belgio	FR Francio	MG Madagaskaro	SI Slovenio
BG Bulgario	GB Britio	MK Makedonio	SK Slovakio
BI Burundio	GE Kartvelio	MN Mongolio	SM Sanmarino
BJ Benino	GH Ganao	MT Malto	SN Senegalio
BM Bermudo	GR Greklando	MX Meksiko	SY Sirio
BO Bolivio	GT Gvatemalo	MY Malajzio	TG Togolando
BR Brazilo	GY Gvajano	NA Namibio	TH Tajlando
BY Bjelorusio	HK Honkongo	NC Nov- Kaledonio	TJ Taĝikio
BZ Belizo	HR Kroatio	NE Niĝerlando	TN Tunizio
CA Kanado	HT Haitio	NG Niĝerio	TR Turkio
CF Centrafrika Resp.	HU Hungario	NI Nikaragvo	TW Tajvano
CG Kongo	ID Indonezio	NL Nederlando	TZ Tanzanio
CH Svislando	IE Irlando	NO Norvegio	UA Ukrainio
CI Ebura Bordo	IL Israelo	NP Nepalo	US Usono
CL Ĉilio	IN Hinda Unio	NZ Nov-Zelando	UY Urugvajo
CM Kamerunio	IR Irano	PA Panamo	UZ Uzbekio
CN Ĉinio	IS Islando	PE Peruo	VA Vatikano
CO Kolombio	IT Italio	PF Peruo	VE Venezuelo
CR Kostariko	JP Japanio	PG Papua	VN Vjetnamio
CU Kubo	KE Kenjo	Nov-Gvineo	YU Jugoslavio
CZ Ĉeĥio	KH Kamboĝo	PH Filipinoj	ZA Sud-Afriko
	KR Korea Resp.	PK Pakistano	ZR Zairio
	KW Kuvajto		ZW Zimbabvo


EGE KOMPLIKA PARENCECO

Antaŭ ol mortigi sin, iu homo skribis ĉi tiun leteron:

“Mi edziĝis kun vidvino. Ŝi havis junan filinon. Post kelkaj jaroj mia patro (same vidvo) edziĝis kun mia duonfilino, do ŝi fariĝis mia duonpatrino kaj mia patro iĝis mia bofilo. Mia edzino naskis filon, kiu samtempe estis bofrato de mia patro kaj mia onklo, estante la frato de mia duonpatrino. Ankaŭ la edzino de mia patro naskis filon, kiu iĝis mia frato kaj ankaŭ mia nepo, estante la filo de mia duonfilino.

Tiamaniere mia edzino iĝis ankaŭ mia avino, estante la patrino de mia duonpatrino. Mi miavice estis la edzo de mia edzino kaj ankaŭ ŝia nepo. Ĉar la edzo de la patrino de ĉiu homo estas ties avo, tiel mi estis mia propra avo.

Kiel mi povis toleri tian situacion? Mi ne havis alian elekton ol mortigi min.”



La maldekstrularo en Germanio

(de: Will Firth, Berlin)

Preskaŭ ĉiuj samtempuloj konsentos, ke la politikaj nocioj *dekstra* kaj *maldekstra* fariĝas tre malprecisaj. Plej malfrue post la kunfandiĝo de *maldekstraj* komunistoj kaj *destraj* naciŝoviniŝtoj en Rusio por indas profunde pridubi la taŭgecon de tiuj nocioj kiel difiniloj. Konsciante pri tiu manko, mi tamen ne trovis alternativan kadron por priskribi la plej diversajn socialistojn, komunistojn, anarklistojn kaj similulojn en Germanio. Do por doni superrigardon mi jes uzas la terminon *maldekstra* en la tradicia senco por skizi bildon laŭ konataj trajtoj. Kiel tradicie difini la maldekstrularon? Tio estas homoj, partioj kaj grupoj, kiuj orientiĝas laŭ la bezonoj kaj aspiroj de la laboristaro (laŭ sufiĉe larĝspektra difino) kaj luktas por atingi tiujn celojn. Maldekstreco per si mem entenas eldiraĵojn pri ekologiaj aŭ genraj demandoj, do mi klopodas konsideri tion kadre de la tradicia difino. Kompreneble, tia kelkpaŝa superrigardo povas esti nur supraj.

Reformemaj partioj

La plej granda tradicie maldekstra partio en Germanio estas la SPD (Socialdemokratia Partio de Germanio) fondita en 1890. Laŭ ĝia historia evoluo ĝi estas laborista partio, sed en pluraj fazoj ĝi ĉiam pli foriris de sia kontraŭkapitalisma politiko, fariĝante porkapitalisma, porŝtata partio. Hodiaŭ ĝi ne plu meritas la nomon *maldekstra*, sed ĝi menciindas ĉi-tie pro la historia interrilataro. Estas historiaj ligoj inter SPD kaj la plej grandaj sindikatoj, hodiaŭ unuiĝintaj en DGB (Unuiĝo de germanaj sindikatoj), tamen ne ekzistas elementoj de organiza sintezo, kiel ekz. ĝis antaŭ nelonge inter la brita Laborista Partio kaj la tieaj sindikatoj.

La junulara organizo en la SPD (plej ofte nomita mallongige *Jusos*) estas iom pli vigla kaj maldekstra ol sia plenkreskujo. Multkaze la membroj de *Jusos* kunlaboras en sociaj movadoj kaj progresemaj kampanjoj, sed ĝenerale ili restas en la politikaj katenoj de SPD kaj liveradas postenulojn al la SPD-burokrataro.

La *Unuiĝo 90 / La Verduloj* estas reformema partio, kies speciala temaro estas protektado de la naturmedioj. Nuntempe ĝi estas precipe parlamenta partio, distancigante sind ĉiam pli de sia iama interplektiĝo kun radikalaj sociaj movadoj. La partio tamen meritas menciion ĉi tie pro la interesa historia evoluo. Estiĝinta en 1980 en okcidenta Germanio sub la nomo *La Verduloj*, ĝi arigis multajn radikalajn aktivistojn, kiuj alstrebis pli ol nur ekologian ŝanĝiĝon. Impostiome profundiĝis la partopreno de tiu ĉi *malpartieca partio* en parlamentoj, impostiome la partion forlasis la *fundamentulo* - radikaluloj, kiuj ne povis plu toleri la reformeman porparlamentan allron. En 1990, la jaro, kiam unuĝis FRG kaj GDR, en la GDR-aj parlamenta balotado partoprenis la partio *Unuiĝo 90*, bunta miksaĵo de porekologiaj, homrajtaj kaj maldekstraj aktivuloj. Atlinginte modestan sukceson en tiu balotado, ĝia plua evoluo sekvis tion de *La Verduloj* en okcidenta Germanio, kun kiu ĝi unuiĝis en 1992.

Aparte en orienta Germanio ekzistas *Verdula Ligo* en kies kadro radikalaj verduloj aplikas eksterparlamentan aliron al medioprotektaj kaj sociaj temoj.

(Daŭrigo – maldekstrularo paĝo 15)

Socialismaj kaj komunismaj partioj

La politika ŝanĝaro de la fruaj 90-aj jaroj – speciale la disfalo de la orienteŭropa ŝtatobloko – kondukis al gravaj ŝanĝoj ĉe la socialismaj kaj komunismaj partioj. Kelkaj malaperis, multaj ŝanĝis la nomon kaj la strukturojn. Menciinda ĉi tie estas la transformiĝo de la reganta stalinisma partio de GDR, (*SED – Partio de Socialisma Unueco*), al *PDS (Partio de Demokrata Socialismo)*. *PDS* estas specife orientgermana partio kun nur malgranda membraro en okcidento. Hodiaŭ ĝi estas socialdemokratieca partio kun stalinisma alo. Precipe en okcidenta Germanio ekzistas *MLP/D (Marksisma-Leninisma Partio de Germanio)* kaj *DKP (Germana Komunisma Partio)*. La lasta spertis rapidan disfalon en 1990, kiam elmankis la mona subteno el GDR. *PDS* kaj *MLPD* partoprenas en parlamentaj balotoj. *PDS* havas modestajn sukcesojn ĉe tutlanda nivelo; krome, en kelkaj orientgermanaj landoj ĝi ricevas pli ol 20% de la voĉoj kaj estas reprezentata en kelkaj landaj parlamentoj.

Inter la multaj denaskaj turkoj kaj kurdoj en Germanio ekzistas diversaj maldekstraj tendencoj ekz. la maŭistaj *Turka Komunisma Partio – Marksisma-Leninisma (TKP-ML)* kaj *Revolutionary International Movement (RIM, Revolucia Internacia Movado)*, aŭ la *Laborista Partio de Kurdoj (PKK)*, kiu en Germanio estas malpermesata.

Apud tiu ĉi pli grandaj maldekstraj partioj ekzistas diversaj organizoj kaj malgrandaj partioj, kiuj radikas en marksismaj tradicioj ekz. trockismaj partioj. Ĉi-kontekste menciindas *Linksruck (Puŝo maldekstren)*, kvazaŭ filio de la brita *SWP (Socialista Laborista Partio)*, kiu inspiriĝas de Trocki, Luxemburg kaj Gramsci, kaj volas revoluciemigi la sindikatojn kaj devigi la socialdemokratian partion sekvi porlaboristan politikon. Krome ekzistas *Voran (Socialisma Alternativo Antaŭen)*, filio de la brita partio *Militant (Revolucia Socialisma Ligo)*, la germana sekcio de la 4-a Internacio, *VSP (Unuiĝinta Socialisma Partio)*, kaj pluraj trockismaj grupoj.

Socirevoluciaj organizoj

Diferenco inter socialismaj/komunismaj partioj kaj la ĉi-sube priskribitaj organizoj estas la rilato al formalaj hierarkioj kaj la nocio de ŝtata povo. La socirevoluciuloj alstrebas socian ŝanĝiĝon kun tuteca perspektivo – solidara vivformoj anstataŭigu kapitalismon, ŝtaton, rasismon, viraran povon ktp. Malakceptante partlecajn strukturojn, la socirevoluciuloj tamen ne povas ĉiam liberigi sin de neformalaj hierarkioj kaj diversspecaj dogmoj.

Antaŭ ĉio menciindas ĉi-tie la *aŭtonomuloj*, radikala movado, kiu estiĝis depost 1968 kiel junulara ribelo. Kiel agadbazoj de la aŭtonomula movado funkcias t.n. *Informejoj* kaj, depende de loko kaj tempo, diversaj okupacitaj domoj. En multaj kazoj la *Aŭtonomuloj* interkruciĝas kun anarkiismaj kaj komunismaj grupoj, do, ekzistas plej diversaj ideologiaj hibridoj. *Ökolinx (Ekologia maldekstra)* formiĝis post kiam parto de la verdulpartiaj *fundamentuloj* kun s-ino Jutta Dittfurth forlasis la partion en majo 1991. *Ökolinx* okupiĝas pri radikala medioprotektado el kontraŭŝtata, kontraŭkapitalisma vidpunkto. *Wildcat (Sovaĝa resp. neoficiala striko)* estas reto de plimalpli marksismaj aŭtonomuloj, kiuj subtenas spontane estiĝintajn lanorkonfliktojn kaj klopodas subtene radikaligi la partoprenantajn laboristojn. *Freie Arbeiter Union (FAU, Libera Laborista Unuiĝo)* estas anarki-sindikata organizo, kiu klopodas evoluigi kutimojn de rekta agado en diversaj vivkampoj – precipe

(Daŭrigo k. fino – paĝo 17)

(Daŭrigo – maldekstrularo de paĝo 16)

en laborkonfliktoj – sed precipe okupiĝas pri propagando de anarki-sindikatismo. Ĝi estas la germana sekcio de la *Internacia Laborista Asocio. Initiative für eine anarchistische Föderation in Deutschland (I-AFD – Iniciativo por Fondi Anarkiisman Federacion en Germanio)* estas malgranda sed sufiĉe aktiva organizo, kiu partoprenas en diversaj radikalaj kampanjoj kaj anarkiistaj projektoj, klopodante kunligi la disajn erojn de la anarkiista movado. (Necesas rimarki, ke multaj anarkiistoj ne konsideras sin maldekstruloj, eble pro deziro distancigi sin de stalinistoj, trockistoj ktp. Menciindas, ke ekzistas skolo de sufiĉe *dekstraj* anarkiistoj, kiuj opinias, ke la ĉefa fonto de malbono en la mondo estas la ŝtato – ili do perparolas *liberan kapitalismon*.) Tiun-ĉi alineon mi finu per mencio de la *Föderation Gewaltfreier Aktionsgruppen (FÖGA – Federacio de Senperfortemaj Agadgrupoj)*, reto de anarkiistoj-pacistoj, kiuj antaŭ ĉio entreprenas porekologiajn kaj kontraŭmilitarismajn kampanjojn. Ĝi eldonas interesan ĉiumonatan gazeton *Graswurzelrevolution (Desuba revolucio – lauvorte: revolucio de la herbradikoj)*.

La maldekstra gazetaro

Ĉiu organizo kaj grupo menciita ĉi-supre havas propran (aŭ politike tre proksiman) journalon kajaŭ revuon. En la aŭtonomularo ekzistas imponiga diverseco de gazetoj kaj libraĵprojektoj. Pro tio ne estas hazardo, ke la konata germana anarkiisto Horst Stowasser iam komparis la aŭtonomulan/anarkiistan movadon kun homa fetu – ĝi havas grandan, kvazaŭ hidroĉefalan kapon (t.e. la teorion) kaj malgrandan korpon (t.e. la praktikon)!

Maldekstraj ĉiutagaj ĵurnaloj est *Neues Deutschland (Nova Germanio)*, kiu plimalpli reprezentas la politikon de *PDS, Die Tageszeitung (tax)*, kiu politike proksimas al la *Verduloj*, kaj *Junge Welt (Juna Mondo)*, kiu prezentas radikalan maldekstran vidpunkton (precipe marksisman). En 1996 post konflikto en la redakcio de *Junge Welt* estiĝis nova ĉiusemajna gazeto *Jungle World (Ĝangala Mondo)*, kiu prezentas malortodoksan, radikale maldekstran opinionaron. Ankaŭ menciindas la ĉiumonata revuo *KONKRET*, sur kies paĝoj sin esprimas diversaj plimalpli radikalaj maldekstruloj. Probable ĝi estas la plej larĝa legata maldekstra revuo en Germanio.

Volo

La red. : Ĉi-supra artikolo estas tre informa kaj ni dankas la verkiston Volo por la tre legebla teksto. Volonte la redakcio salutas pluajn objektivajn tekstojn pri la temo. – Kiam leganto aŭ leganto trovos tajperarojn, pri tio la redakcio pardonpetas.

AFS

Ni ricevis ekzempleron de la *SLEA-INFORMILO 5/2001. Dankon! La informilo de la Sveda Laborista Esperanto-Asocio, redaktoro Pelle Persson, prezentas tre interesajn tekstojn pri «Faktoj pri GULAG» de Janos Rózsás; tradukis Tibor SZABADI (Hungario). La teksto (52 paĝoj) estas havebla kontraŭ 5 Euro/10 gmk. Ĉu vi interesas? Bv. mendi ĉe la redakcio de MAGAZINO:*

La lasta dato por manuskriptoj al la sekvanta eldono de *MAGAZINO* estas 28 februaro 2002!

Hobio? Ne!

Artikoloj aperintaj en LI (=Laute!) postulas reagon. Esperanto ne estas hobio nek *ĉevaleto* (kio estas tio eta ĉevalo?) nek iu alia. Esperanto estas fako, scio, je dispono de ĉiuj. Ĝi estas rimedo por komuniki kun la tuta mondo, sed neglektata de la plejparto.

Kial? Ĉar ĝi ne estas oficiale adoptita. Kie situas tiu land *Esperantujo*? Kiu regas ĝin? Al kiu partio apartenas ĝiaj politikistoj? Kiom da mono estas elspezata por disvastigi ĝin? Kiu regas tiun buĝeton?

Kiu parolas tiun artefaritan lingvon? Nur utopiuloj ankoraŭ kredantaj, ke komuna lingvo, klara, facile lernebla kaj komprenebla, povos forigi por ĉiam tiujn militojn bruantajn en multaj anguloj. Kiu aŭdas tiujn originalulojn parolantajn nur pri paco? Vi neglekte forgasas nian ekonomion, bazitan ĉefe sur komercado de armiloj, de mortigiloj. Kion enspezos tiuj internaciaj firmaoj, kiam ili ne plu devos fabriki ŝtalajn tankojn kaj kanonojn, sed plugilojn, rastilojn, trulojn kaj kultibmaŝinojn? Ili ne kapablos! Ili ne plu trudos al ĉiuj sian komercan dialekton, kiam ili estos devigataj paroli *pacan lingvon*.

Ho jes! Ni scias, ke nia internacia lingvo ne estas perfekta. Sed de pli ol cent jaroj ĝi disvastiĝis tra la tuta mondo, malgraŭ la bremsadoj kaj malpermesoj de faŝistaj reĝimoj kaj kontraŭado de fuŝaj politikistoj. Ĝi jam evoluis, perfektigis kaj ankoraŭ perfektiĝos.

Ankoraŭ hodiaŭ la multnombraj eterna komencantoj povas kredi, ke la lingvo estas malfacile lernebla. Sed ĉu la kialo ne estas la nekapablo de tiuj maljunaj lernantoj, kiuj atendis, ke ilia memoro kadukiĝis kaj forlasis ilin, por studi Esperanton kaj almeti en sian mensan sagujon plian eblecon, ebligantan komunikoj kun multaj aliaj, kies lingvon ili ne scipovas kaj ne plu kapablos lerni?

Ne estas hobio tiu ligilo, kiun multaj propagandas per patra lingvo, ĉar ili ankoraŭ ne kapablis asimili ĝin kaj perdi teruran enradikiĝintan akcenton (aŭ akĉento: vi elektu la nuancon, kiun vi preferas!).

Esti esperantisto ne estas nur kunveni por amike krokodili ĉirkaŭ tablo pri esp-aj eldonadoj. Esperanto estas ne nur rimedo por vojaĝi kaj preteksto por renkonti akceptontajn fremdulojn, kiuj vin gastigos malmultekosta. Tiuj foraj parencoj de Esperanta Familio suferas la samajn problemojn kaj zorgojn, kiel ni mem. Ne estas hobio tiu ekspluatado de afableco kaj amikeco.

Jes! Nia mondo ne estas perfekta, sed estas la tuto stariganta demokration en mezurita toleremo.

Modesto (el FR-kodo 57)

Kara Modesto, mi ŝatas vin kaj via afabia familio. Estis agrablaj horoj esti gastigita en via hejmo. Por ricevi informojn pri homoj en fremdaj landoj, oni studas lingvojn. Jam lerni unu lingvo ekz. la angla, oni bezonas multajn jarojn. Pro tio mi siatempe opiniis, ke pli taŭgas lerni internacian ĉie en la mondo uzebla lingvo – mi trovis Esperanton kaj neniam bedaŭris scipovi ĝin!

Alberto

Kiel jam informita, gesroj Mattusch en Düsseldorf prilaboras Historion pri la Esperanto-Movadoj en ĉi tiu urbo. Ĉar mi estis membro de la urbaj E-grupoj (LEA/G k E-Societo Düsseldorf) mi povas helpi pri materialo kaj eĉ fotoj. La geverkistoj ricevis ankaŭ allaflanke tekstojn, bildojn ktp. l.a. de la Fritz-Hüser-Instituto. – Ĉar mi estis jam LEAS/G-prezidanto dum multaj jaroj en Düsseldorf, la ge-Mattusch petis min pri Grußwort. Mi faris. Jen la teksto germanlingve, ĉar la verko aperos en 2002 german- kaj esperantlingve.

Grußwort des Vorsitzenden des Freien Esperanto-Bund

Der allgemeine Ruf nach Verständigung gebietet die Beseitigung eines grundsätzlichen Hindernisses, das immer noch allen Bemühungen hemmend entgegenwirkt: die gegenseitige Isolierung der Völker durch die Verschiedenheit ihrer Sprachen.

Zu begrüßen ist dazu der Einsatz der Menschen weltweit, die sich die internationale Sprache Esperanto als Zweisprache zu eigen gemacht haben und in Gemeinschaften und auch einzeln aktiv an ihrer Verbreitung mitwirken, um Verständigung und Freundschaft zu pflegen und gesellschaftliche Mißverständnisse auszuräumen.

Eine solche aktive Gruppe war und ist die Esperanto-Sprachgesellschaft Düsseldorf, an deren Tätigkeiten ich einige Jahre teilnehmen konnte. Später dann für die Gemeinschaft der Arbeiter-Esperantofreunde. Es hat mir immer viel Freude bereitet unter gleichgesinnten Menschen zu sein, mit ihnen für die Idee des Sprachschöpfers Dr.L.L.Zamenhof, für Esperanto mich einzusetzen.

Deshalb freue ich mich besonders, dass die Düsseldorfer Esperantisten keine Zeit und Mühe gescheut haben, um unter Federführung des Ehepaares Mattusch die langjährige Geschichte des Esperanto in Düsseldorf zu erforschen und in dieser Festschrift vorzulegen.

Die Leser der Historie und alle Freunde der Esperantosprache in Düsseldorf und darüber hinaus grüßt in Verbundenheit

Albert Stephan

(El la aktiveco de LEA/G-geamikoj)

Interŝanĝoj de spertoj

Nia asociano Ronald SCHINDLER, Frankfurt/Oder, estas tre vigla esperantisto. Mi konatiĝis kun li antaŭ jaroj, kiam li profesie vizitis Düsseldorf. Ek de tiu tempo ni korespondas ĉiam kiam nia libertempotio permesas kaj, interŝanĝas spertojn en aktivecoj por asocioj.

Ronald estas la redaktoro de la *Brandenburgia Informilo*, kaj, la dua prezidanto de la *Brandenburgischer Esperanto-Verband*, Sitz Potsdam.

Jen eliraĵoj el la asocia informilo 11/2001 :
« Je la 2000-12-10 en la nova Potsdam-Centro ... okazis la ĉefa jarkunveno de la Brandenburgia Esperanto-Asocio. Dek el 44 membroj partoprenis je ĉi tiu aranĝo. Kiel gasto ni povis bonvenigi esperantistinon el St. Peterburgo. »

« Zamenhoffesto en Berlino 2001 okazos sabataon, la 15an de decembro je la 15 horo sub la temo: Venas la Eŭro, kiam venos Esperanto? ... »

EURO – kurzoj

1 Euro =	1.95583 DEM - Germanio
	40.3399 BEF - Belgio
	166.386 ESP - Hispanio
	6.55957 FRF - Francio
	.787564 IEP - Irlando
	1936.27 ITL - Italio
	40.3399 LUF - Luksemburgo
	2.20371 NLG - Nederlando
	13.7603 ATS - Aŭstrio
	200.482 PTE - Portugalio
	5.94573 FIM - Finnlando

Per rezolucio de la Eŭropa-konsilario publikigis la Eŭropa Centralbanko la suprajn kurzojn je la 31.12.1998.

Apernotoj / Impressum

Eldonanto/Herausgeber:

Libera Esperanto-Asocio por germanlingvaj Regionoj (LEA/G) Freier Esperanto-Bund für deutschsprachige Gebiete

Renchener Str.47, (DE)-77704 Oberkirch

(Tel+Fax): (0)7802 – 90 336

LEA/G en TTT: <http://home.nexgo.de/gmickle/leag/index.html>

Redakcio: Interreto/Internet

Gary Mickle (GM), Brüsseler Str.6,

(DE) 13353 Berlin

Retadreso/E-Mail-Adresse

gmickle@nexgo.de

Albert Stephan, Renchener Str.47,

(DE) 77704 Oberkirch (Baden)

Hans Rodewig, Stammestr.86D

(DE) 30459 Hannover

Aŭtoroj responsas mem pri la enhavo de siaj artikoloj; la redakcio rajtas mallongigi aŭ rifuzi alsendaĵojn.

Redaktofino 30 tagoj antaŭ la apero de la organo.

MAGAZINO aperas trifoje jare / erscheint dreimal jährlich – aprilo-aŭgusto-decembro –

kiam ebla kvarfoje/wenn möglich vier Mal

Abonprezo/Bezugspreis 8 Euro

La membrokotizo entenas liveradon de la organo / der Mitgliedbeitrag beinhaltet die

Lieferung des Organs.

LEA/G-konto: Jiri Proskovec, Dortmund

n-ro 9168-434 Postbank Essen

(BLZ 360 100 43)

(BLZ 360 100 43)

Represo de tekstoj k.a. el MAGAZINO estas


Permesataj, se la fonto estas indikita.

**Esperanto, internationale Sprache,
ist das Kontaktmittel weltweit!
Esperanto, Lingvo Internacia, estas
kontaktilo en la tuta mondo !**

Sinjorino E.MATTUSCH, Benrodestr.127, en

(DE)40597 Düsseldorf, estos dankema por ĉiu materialo pri la Esperanto-grupo en Düsseldorf; ŝi vendas historion.

WALTER POPPECK estas ĉiutempe aktiva. Li havas bonan draton al la lokala gazetaro. Ofte aperas artikolo de li pri okazaĵoj en la mondo de l' esperantistoj. Tiun tekston ĉi sube mi ne volas deteni la legantaron :



Oberkirch im Sonderheft des Deutschen Esperanto-Bundes

Oberkirch (pck). Aus Anlass des Europäischen Jahres der Sprachen hat der Deutsche Esperanto-Bund (DEB) eine 44-seitige Sondernummer seines Bundesorgans »Esperanto aktuell« herausgegeben, das in der jüngsten Zusammenkunft der Esperanto-Gruppe Oberkirch von Hermann Heiss vorgestellt wurde.

Nach einem Vorwort des Präsidenten des DEB, Dr. Reiner Kurz (Stuttgart), werden die Geschichte des Bundes und die internationale Esperanto-Bewegung dargestellt. Die übersetzte internationale Literatur von Goethe bis Grass wird ebenso gewürdigt wie die Original-Literatur von dem jüdischen Autoren des Esperanto, L.L. Zamenhof, bis zu dem Briten William Auld (der schon für den Nobelpreis vorgeschlagen wurde). Sie finden ebenso Erwähnung wie die übrige Kulturszene des Esperanto von Rock bis Hip Hop, das Esperanto-Theater und Rundfunksendungen.

Oberkirch ist in der Sondernummer von »Esperanto aktuell« mehrfach vertreten. Unter den 80 Kongressen des DEB ist Oberkirch gleich zweimal vertreten, 1962 und 1975. Auch in der Liste der mit der Ehrenmedaille »Pro la merito« ausgezeichneten Aktivisten ist Oberkirch zweimal zu finden. Sie wurde 1975 an Walter Poppeck und 1981 an Hermann Heiss verliehen. Die Darstellung der internationalen Fachgruppe »Handel und Wirtschaft« stammt von deren Vorsitzenden Franz Josef Braun und als Adresse des Freien Esperanto-Bundes (Arbeiter-Esperantisten) wird Oberkirch mit der Anschrift seines Vorsitzenden Albert Stephan genannt.

Die Schrift gibt auf ganzen zwei Seiten einen vollständigen Überblick über die Grammatik der »Internacia Lingvo« sowie eine umfangreiche Liste über weiterführende wissenschaftliche Literatur an.

La Prezidantaro deziras scii, kion la legantaro opinias pri la enhavo de MAGAZINO. Pro tio la redakcio aldonis al ĉi tiun eldonon n-ro 35

Bv. respondi al la demandoj kaj resendi la DEMANDILON al: K.H.Kersting, Bredowstr.3, 45139 Essen

Por kovri vian ekspedkoston, bv. redukti vian kotizpagon per 0,50 Euro. Dankon !

DEMANDILON

SAT-Amikara Kongreso 2002

Dank'al SAT – Amikaro, al kiu ni flegas amikecajn rilatojn, eblas, ke LEA/G-membroj kaj –simpatiantoj povos partopreni ties kongreso en la venonta jaro. LEA/G intencas, tiam aranĝi kunvenon.

Jen nia dua komuniko:

Loko kaj datoj

La 57-a Kongreso de SAT-Amikaro okazos la 30-an kaj 31-an de Marto, la 1-an kaj 2-an de Aprilo 2002 en Internacia Restada Centro (*Centre International de Séjour*) situanta proksime de vilaĝo *Vigy* (en departemento Moselle) kaj administrata de Departementa Asocio por Populara Edukado kaj Plenaera Vivo (*Association Départementale d'Education Populaire et de Plein Air, avenue Charklemagne, FR-57640 Vigy*).

Kongresejo Ĝi disvolviĝos en sonekipita kon-struajo povanta enteni 200-300 personojn, kaj pleie disponos kunvenĉambrojn, kiuj kovras diversajn areojn: unu 145-kvadratmetran, pluraj 20-50 kvadratmetrajn. La kongrespartoprenantoj povas tranokti en domoĉambroj por 1, 2, 2-4, eĉ 10 personoj.

La tutaĵo de la ekipaĵoj estas partigita inter 5 malaltaj konstruajoj, troviĝantaj en parko, kiu kovras 13-hektaran areon. Kampoj, herbejoj kaj arbaroj en la proksimeco de kongresejo ebligas al la natur-amantoj piedajn promenaĵojn.

La organizantoj de l'Kongreso

La okazigo estas atribuota al la iniciatemo de la membroj de Esperanto-Klubo de la Tri-Lima Lando. Lastkunvene la membroj decidis ŝanĝi la nomon de la klubo en *Espéranto-Thionville*.

La Organiza Kongresa Komitato (OKK) konsistas el jenaj aktivuloj: Bruno HENRY (*prezidanto*), Catherine GALLEGO (*sekretarino*), Marie José BEHM (*kasistino*), Thomas CORDONNIER, Antonio QUIJADA kaj Bernard VIVIER (*div.funkcioj*).

En Interreto

Espéranto-Thionville preparis TTT-paĝojn por informi pri sia ekzistado kaj pri la kongreso.

Pri la mondo de la ekonomio (prelegoj)

Catherine ROUX esperantlingve prelegos pri la temo: Asocio por impostado super la financaj transakcioj por helpi al la civitanoj.

Membro de Kamparana Konfederacio prelegos franclingve pri jenaj temoj: organismoj genetike modifitaj, misnutraĵoj, novliberalisma tutmondiĝado. (Verŝajne traduko ebla.)

Musikajn prezentadojn la kongrespartoprenantoj povos ĝui. Amuzos vin la muzikgrupo MANNIJO diversvespere. Pri aliaj distraĵoj OKK informos vin en venonta komuniko.

(Daŭrigo paĝo 23)

(Daŭrigo)



Kongresmarkoj

OKK eldonis ilin per folio kiu konsistas el 24 markoj. Prezo: 5,-- DM/2,55 Euro plus eksped-kostoj 1,-- DM/-,50 Euro, entute ronde 6,-- DM/3,-- Euro. – La markoj estas akirebla ĉe: A.Stephan, Renchener Str.47, 77704 Oberkirch (Baden).

Vi povas pagi per germanaj poŝtmarkoj - bv. uzi taŭgan ne travideblan koverton – aŭ, per poŝtgiro al la konto de A.Stephan Postbank München (BLZ 700 100 80) Kto: 629867-806. Dankon!

NEKROLOGO

La 24-an de oktobro ĉj. mortis en Düsseldorf en aĝo de 88 jaroj nia fidela kaj tre aktiva membro Carl-Ludwig Thies.

Li apartenis al nia asocio jam ek de la komenco 1956, kiam lia patro estis prezidanto de la urba LEA/G-grupo. – Ni kondolencas al la filino sinjorino Vera Brauer kaj familio.

Informado

Informoj pri la kongreso estas haveblaj sub la jena poŝta adreso
Bruno HENRY 5, rue Jean Mermoz

FR-57100 Thionville

Tel : 03.82.54.32.91

Interrete :

<esperanto.thionville@laposte.net

<http://www.multimania.com/esperantothionv/> >

Aliĝiloj estas haveblaj ĉe Albert Stephan, Renchener Str.47, 77704 Oberkirch (Baden)



Esperanto RP 31-7-2001

Missverständlich

Das Forschungsprojekt der Düsseldorfer Esperanto-Gruppe, die Esperanto-Geschichte der Stadt von 1907 bis heute, bleibt unerwähnt.

Esperantisten küssen sich nicht zur Begrüßung, man redet sich nicht generell mit Du an, von indoeuropäischen Sprachen zu sprechen ist irreführend, die Modernität nur am Wort Computer zu demonstrieren, ist missverständlich. Eine seit über 100 Jahren anerkannte Sprache als „Kauderwelsch“ zu bezeichnen, ist ein Unding, denn dieser Ausdruck steht laut Duden/Herkunftswörterbuch für „unverständlich, verworren, radebrechend“.

Viele Mitglieder der Gruppe wurden unter dem Nationalsozialismus verfolgt. Ihre Nachfahren mit ein „bisschen schräg“ und „übrig geblieben aus einer anderen Zeit“ zu charakterisieren, ist, da es sich bei allen um gestandene und seriöse Bürger handelt, nicht korrekt. Die Diskussion um die Verwendung einer künstlich geschaffenen Sprache wird seit über 100 Jahren kontrovers geführt.

Selbst wenn der Artikel aus einem sympathisierenden Gesichtspunkt heraus geschrieben sein sollte, kann er leicht gegenteilig aufgefasst werden.

Dr. M. H.-J. Mattusch
Benrodestraße 127

Rim. de la redakcio:
lu jurnallsto de la taga gazeto
Rheinische Post, Düsseldorf,
vizitis la E-grupon kaj, ŝmiris'
fi-artikolon. Ankaŭ mi protes-
tis. Stephan

Alfabet des Esperanto

Es umfasst 28 Buchstaben:

a b c ĉ d e f g ĝ h ĥ i j ĵ
k l m o p r s ŝ t u ŭ v z

Zu sprechen: c wie z in Zeit
ĉ wie tsch in deutsch
ĝ wie dsch in Dschungel, Gin
ĥ wie ch in Dach
j wie stimmhaftes sch
s wie stimmloses s
ŝ wie sch in schön
v wie w in Wald
z wie stimmhaftes s in Reise

Der Buchstabe ŭ ist Halbvokal und wird mit A, e und o als kurze Silbe gesprochen. Die Vokale a, e, i, o, u sind mittellang u. offen

Auf der Computer-Tastatur findet man die Sonderzeichen unter Schriftart Lat3 Arial wie folgt:

ALT drücken und antippen Zahlen rechts -
0198 = Ĉ, 0230 = ĉ, 0216 = Ĝ, 0248 = ĝ,
0166 = Ĥ, 0182 = ĥ, 0172 = Ĵ, 0188 = ĵ,
0222 = Ŝ, 0254 = ŝ, 0221 = Ŭ, 0253 = ŭ

Sonstige in anderen Sprachen übliche Buchstaben und Überzeichen, die manchmal beim Schreiben von Adressen ausländischer Esperanto-Freunde gebraucht werden:

0208 = Đ, 0209 = Ñ, 0394 = Š, 0231 = Œ,
0241 = ñ, 0396 = Œ, 0447 = Ł, 0491 = ě

Weitere Zeichen:

0409 = ™, 0425 = ©, 0426 = ®, 0430 = ®,
0445 = ½, 0446 = ¼, 0693 = µ, 0666 = š

Man findet noch viele mehr; probier es aus!

AFS

Esperantistoj uzas la < ci > (=du) nur por tre bona amiko. Kelkfoje estas kutima, uzi la antaŭnomon de la parolpartnero, kiam ili/si tion permesas. - Mi permesas... Albert